

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

117-a jaro • n-ro 1386 (1) | januaro 2024

Novjara Mesaĝo por 2024 de la Prezidanto de UEA | 3

La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto: rete kaj tutmonde | 6



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon, la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbek
Ikonoj (bildetoj) sur la kovrilpaĝo: <https://icons8.com>

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org
Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Generala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas minimume €20,00). Menu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A
(Universala Esperanto-Asocio en
Rotterdam, Nederlando)
PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
tel.: +31-10-436-1044
uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



3

Novjara Mesaĝo por 2024 de la Prezidanto de UEA

Mi deziras al ĉiuj vibrante ĝojan 2024, laborante en konkordo por certigi per la pli vasta uzado de nia lingvo pli kompreneman kaj pli pacan mondon!



6

La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto: rete kaj tutmonde

VK iĝis tradicia kaj la plej granda virtuala renkontiĝo en Esperantujo. Ĝi montris daŭripovecon kaj iĝis bona ilo por UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale.



12

Japana Esperanto-Kongreso kun la temo "Kion Esperanto nun revas por la mondo?"

Kawasaki, 21–22 oktobro 2023
La kongreso havis krome almenaŭ du aliajn senprecedencaĵojn: "Retan Kultur Festivalon" kaj aranĝon de, se tiel diri, "satelitaj" kongresejetoj en lokoj kelkcent kilometrojn for de Kawasaki.



16

Unu poemo, unu urbo. Pri la 4-a Liaoninga Recitado de Esperantaj Poemoj

Iu diris, ke poemo estas bildo, poemo estas kanto, poemo estas pluvo, sed mi volas diri, ke poemo estas vojaĝo, poemo estas urbo.

UEA | 4
Premio Grabowski 2023 aljuĝita dum la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto

Laste Aperis | 5

Kulturo | 9
Interkultura Novelo-Konkurso (INK): 4-a eldono lanĉita kun nova temo

Afriko vokas | 10
Poemo *Pensi Afrikon*

Virtuala Kongreso | 14
La plej bona urso en la tuta mondo gastis ĉe la Virtuala Kongreso

Kulturo | 15
Tibor Sekelj – denove en la japana

AMO | 19
Produktiva jaro por la AMO-programo

Oficiala Informilo | 20
Fake, Science kaj Profesie tra la mondo
Virtualaj Sciencaj kaj Fakaj kunvenoj (VK, IRIS) kaj nova esploro pri eksterplanedoj

Dua Internacia Reta Interfaka Simpozio de TEJO | 21

Forpasoj | 22

Estraro

Prezidanto: D-ro Duncan Charters (Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsah, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Perence 42/503 Rio de Janeiro RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel (Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto, Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Generala Sekretario: S-ro Aleks Kadar (Administrado, Delegita Reta, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj

kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75013 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute (Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândusei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timisoara, Rumanio
Poŝtel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ino Gong Xiaofeng (Universitata agado ekster Eŭropo, Rilatoj kun CED, Rilatoj kun edukado.net, Virina agado)
19-1-502, Jinyuan Yangguang, Xinjian District, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio
Poŝtel. +86 186 0791 0758
arko.gong@qq.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo (Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

Poŝtel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabyumva (Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu (Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsseo Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Michal Matušov kaj S-ro Tyrone Surmon

Observanto de ILEI:
Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>

Novjara Mesaĝo por 2024 de la Prezidanto de UEA

■ Duncan Charters

Fine de 2023 mi skribas de Ĉinio, kie mi ĵus ĉeestis imponan ceremonion por celebri la 10-an datrevenon de la fondiĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo en la Universitato de Zaozhuang. Tiu okazo simbole memorigis pri la signifaj atingoj de la pasinta jardeko aldone al tiuj de la lasta jaro. Unika muzeo enhavanta ekspozicion kaj riĉan kolekton pri la historio, progreso kaj aktuala uzado de nia lingvo, subtenata de ŝtato kaj institucio per kunlaboro de universitato kun ĉeestantaj klarvidaj administrantoj, antaŭaj kaj aktualaj, kaj aktiva Landa Asocio de UEA, Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝiaj membroj kuniĝis kun lokaj partoprenantoj de la universitata komunumo, kies ducentopa publiko plenigis la belan aŭditorion. Studentoj de la Esperanto-fako de la Universitato ĝoje sin prezentis per filmo kaj kantado, kaj poste renkontiĝis kun mi kiel reprezentanto de UEA por dialogi en klara Esperanto pri iliaj demandoj rilate nian Asocion kaj la estontecon de nia lingvo. Kuraĝiga evento por niaj ĉinaj samideanoj kaj ĉiuj el ni.

Tiu relative lastatempe iniciatita centro okupos post du jaroj la duan etaĝon de biblioteko konstruata en tuta nova kampuso de ĝia universitato, kies internacia instituto antaŭenigas la studadon de lingvoj inkluzive Espe-

ranton, kaj interŝanĝon de studentoj el multaj landoj. Anonciĝis dum la ceremonio ke en salono en la nuna kaj estonta Muzeo estos videbla nomŝildo indikanta “Azia Biblioteko de Universala Esperanto-Asocio” por indiki la apogon de UEA al kreskigo de tiu plej signifa kolekto en Azio, kiu servos al studentoj, esploristoj kaj esperantistoj ne nur en tiu kontinento sed en la tuta mondo.



Paralele al tiu atingo la arĥivo de UEA trovis profesie prizorgatan hejmon en ŝtata institucio de Aŭstrio en Vieno, kies laboro estis ĵus raportita en nia revuo kaj en nia plene sukcesinta

4-a Virtuala Kongreso, kunorganizita de UEA kaj ĝia Kongresa Fako, daŭre tre kompetente prizorgata kontrakte de E@I. Ĝiaj ĉefaj prezentaĵoj estos spektablaj de membro-aliĝintoj ĝis la jarfino, atingo kiu alportas niajn Kongresojn al pli ol 90% de niaj membroj. La Biblioteko Hector Hodler de UEA trovis sian hejmon en Varsovio kiel agnoskita parto de la nacia heredaĵo en la Nacia Biblioteko de Pollando. Esploristoj interesataj pri Esperanto regule kunsidis por kundividi siajn spertojn kaj kuraĝigi daŭran studadon de la historia fenomeno de Esperanto kaj ĝia interagado kun la ĉirkaŭanta socio.

Nia lingvo kaj movado rezulte allogis ĉiam pli da serioza atento en la universitata mondo kaj en internaciaj rondoj, kie ni ĝuis signifan rekonon kun partneroj en la laboro de UN kaj Unesko kaj iliaj ne-registaraj organizaĵoj (NROj), kiel jam raportite. Niaj atingoj montris ke ni sekvu tiun vojon de servado al la internacia komunumo kiel parto de nia strategia laborplano por 2024 kaj la sekvantaj jaroj. Kiam ni servas al aliaj grupoj por iliaj pozitivaj kunlaborige pacemaj celoj, tiuj notas nian aktivan engaĝiĝon, pretas publike agnoski nian rolon (Esperantlingva “Dankon” sekvis la ĵusan prezentaĵon antaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unkeso de nia estrarano François Lo Jacomo), kaj pli emas subteni pro-

jektojn kiuj servas ankaŭ niajn interesojn. Ne plu validos kritikoj ke ni interesiĝas nur pri ni mem kaj ne pri aktiva kontribuado al progreso en nia mondo.

Eksteraj rilatoj estas grava kolono en nia KIRI, la ĵus lanĉita aliro al la defioj kaj oportunoj kiuj invitos nian atenton en 2024 kaj pli longdaŭre. Kunlaborado estas alia. Kun eksteraj organizitaj grupoj kiel mi ĵus priskribis, sed unuavice en niaj propraj asocioj kaj grupoj. Kial? Ĉar se ni ne kapablos labori en *konkordo* (mi tion citas de la vortoj de d-ro Zamenhof, kiun ni aparte memoras en ĉi tiu momento pro lia unika lingva kaj ideo kontribuado al la mondo), ni nenion povos atingi en la aliaj kampoj. Informado kaj komunikado ricevos apartan atenton en la venonta jaro, kaj nia komisiito Lu Wunsch-

Rolshoven jam komencis atentigi pri niaj bezonoj kaj ni atendu konkretajn planojn. Nia pli intima kunlaborado kun TEJO kaj kun ILEI rezultigu pli da apogo al la Instruado (plia laborkampo) kaj lernado de nia lingvo, sen kies aktiva atento ne povos kreski nia komunumo kun sia pli efika servado al la mondo.

Mi finas per elkore profunda danko al ĉiu membro (kaj ĉiu ĝisnuna nemembro kiun ni invitas aktive al nia laboro!) kunmarŝanta por la donaco de nia idealo al la kunloĝantoj de nia terglobo. Ni havas tute unikan okazon por subteni nian aferon (se tion vi preferas al "movado" kiel mi ĵus aŭdis!) en 2024. Afrikanoj jam alportis la necesan plijuniĝon de niaj rondoj. Ni tion subtenu kiel esencan progreson por la estonteco per nia amasa ĉeestado de la

UK en Afriko kaj financaj kontribuoj por venigi maksimuman Kongresanaron el niaj jamaj aktivuloj. Tiucele ni jam ricevis anoniman donacon de individuo de 10 000 eŭroj. Se ni tion multobligos, nia laboro en Afriko kaj tutmonde povos ricevi fortan impeton. Kaj vi mem havos dumvivajn memorojn pri la elstaraj belaĵoj de nia elektita lando, Tanzanio, kiu nature (dusence!) allogas vizitantojn el la tuta mondo por unu el iliaj plej signifaj vivspertoj.

En la venontaj numeroj de la revuo, vi ricevos informojn pri tio kiel aliĝi individue al la novaj projektoj de nia strategia laborplano, kiu evoluos surbaze de viaj rekomendoj en nia enketilo. Mi deziras al ĉiuj vibrante ĝojan 2024, laborante en konkordo por certigi per la pli vasta uzado de nia lingvo pli kompreneman kaj pli pacan mondon!

UEA

Premio Grabowski 2023 aljuĝita dum la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto



La Premio Grabowski estis iniciatita en 1982 pere de estigo de la Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG). Tio okazis danke al kontrakto de UEA kun la mecenato Adam Goralski (1912–2005), kiu dumvive helpis la administradon de FAG. La unua premiado okazis en 1984. La premio kaj la fondaĵo portantaj la nomon de "la patro de la Esperanta poezio", Antoni Grabowski, celas subteni la Esperantan kulturon. La regularo por disdono de la premioj kaj subvencioj pere de FAG estis nov-

formulita en 2017. La ĵurio de FAG, kiu aljuĝas premiojn averaĝe ĉiun duan aŭ trian jaron, nuntempe konsistas el Jesper Lykke Jacobsen, István Ertl kaj Mariana Evlogieva.

En la fermo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 26-an de novembro 2023, estis anoncita la ĉi-jara Premio Grabowski.

La unua (kaj sola) premio (800 usonaj dolaroj) iras al la eldona teamo de *Militrakonto*, nome Javier Alcalde (Hispanio), Pascal Dubourg Glatigny (Fran-

cio), Catherine Gousseff (Francio) kaj Ulrich Lins (Germanio). La kvar laŭreatoj ricevas la premion pro siaj elstaraj kontribuoj al la scienca studo de la historio kaj kulturo de la Esperantomovado kun aparta enfokusigo de la tutmondaj konfliktoj en la 20-a jarcento, temo al kiu ĉiuj el ili kontribuis unuope kaj kune. Aparta kristaliĝo de tiu kolektiva agado estas ĝuste *Militrakonto*, kiu estas ambicia esplorprojekto pri la transnacia imagaro de la dua mondmilito (en plej larĝa senco), vidata tra la objektivo de Esperant-lingvaj fontoj. En tiu kadro estis iniciatita la retejo *mondmilito.hypotheses.org*, kie regule aperas kontribuajtoj kaj novaĵoj de la internacia esplorgrupo, kiun gvidas la laŭreatoj.

UEA gratulas la premiitojn! La regularon de FAG interesatoj trovi ĉe <https://mallonge.net/16x>.

El la Gazetaroj Komunikoj

Laste Aperis

Beletra Almanako 47 (Junio 2023). Red. P. Daŝgupto, I. Ertl, J.L. Jacobsen, S. Moinhos, N. Ruggiero, A. Stecay. Novjorko: Mondial, 2023. 127p. 22cm. ISBN/ISSN 9781595694560/19373325. Prozo kaj poezio (originalaj kaj tradukitaj), teatro, artikoloj, eseoj, recenzoj. € 11,70

Consilium facultatis. Jan Aleksander Fredro. El la pola trad. A. Grabowski. Chapecó: Fonto, 2023. 91p. 21cm. Proza komedio en unu akto, de aŭtoro fama pro siaj komedioj. € 9,30

Espero fola. Benoît Philippe. Novjorko: Mondial, 2023. 212p. 22cm. ISBN 9781596694584. La tria poemaro de la aŭtoro. Laŭ Jorge Camacho "al ĉi tia poeto nenio estas indiferenta". € 19,80

Franz-Georg Rössler (1949-2017), Leben. Werk. Lebenswerk. Red. Daniel Fromme, Rita Rössler-Buckel. Ubstadt-Weiher: Verlag Regionalkultur, 2022. 180p. 23cm. Germanlingva. Bind. ISBN 97839

55053253. Impona omaĝlibro al multtalenta germana esperantisto. Abunde ilustrita. € 30,00

Ifigenio en Taŭrido. Dramo en kvin aktoj. J.W. von Goethe. El la germana trad. L.L. Zamenhof. Chapecó: Fonto, 2023. 108p. 21cm. Reverko de malnova greka tragedio. € 10,50

Lando de Alvargonzales, La. Antonio Machado. En Esperanton trad. F. de Diego. Chapecó: Fonto, 2023. 63p. 20cm. Per kombino de elementoj realaj kaj fantastaj, la poeto kreas etoson kiu memorigas pri la mezepokaj romanoj. € 6,30

Mondo kaj koro. K. de Kalocsay. Chapecó: Fonto, 2023. 48p. 21cm. La unua originala kolekto de la ĉefa intermilita E-poeto. € 4,80




Nepo de Marina, La. Sten Johansson. Novjorko: Mondial, 2023. 199p. 22cm. ISBN 9781595694591. La tria romano en

kiu ĉefrolas Marina, kiu nun estas avino. € 20,40

Nuntempaj japanaj vortoj kaj esprimoj en Esperanto / Esuperanto gendai yōgo-shū. Yamakawa Syuiti. Tôkyô: La aŭtoro, 2023. 397p. 21cm. ISBN 9784888871075. Listo de pli ol 12 000 japanaj vortoj kaj esprimoj, kun Esperantaj ekvivalentoj plejparte ĉerpitaj el retejoj. € 30,60

Percepto de Delvaux, La / Delvaux no tikaku. Jean Jauniaux. En la japanan trad. Somekawa T. En Esperanton trad. H. Dekeŭnink. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2023. 24p. 21cm. ISBN 9784930785824. Fikciaĵo pri vizito de japanaj turistoj en la muzeo dediĉita al la belga pentristo Paul Delvaux. € 3,60

Somermeznokta sonĝo. William Shakespeare. El la angla trad. K. Kalocsay. Chapecó: Fonto, 2023. 111p. 21cm. Peto-la, burleska am- kaj fe-rakonto en belefluanta lingvaĵo. € 11,10



La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 15% (kun minimumo de 5,00 eŭroj) por ordinara sendo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Por adresoj en EU aldoniĝas AVI (9%) ankaŭ por la sendokostoj. Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo.



Tiuj, kiuj deziras recenzi por la revuo *Esperanto*, estas invitataj kontakti la redakcion ĉe redakcio@revuoesperanto.org aŭ pere de la poŝtadreso, indikita en la kolofono.

Tiuj, kiuj ricevis varon por recenzo, estas petataj sendi la recenzon aŭ kontakti la redakcion. Varojn ricevitajn kaj nerecenzitajn oni fakturos al la ricevinto.

La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto: rete kaj tutmonde

■ Dima Ŝevĉenko
kaj Anna Striganova

Antaŭ tri jaroj, kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (Monda fest'2020, 20.06–20.09.2020), okazis la unua Virtuala Kongreso (VK, 01-08.08.2020). Tiam, dum la pandemio, UEA respondante al la defioj, kiuj staris antaŭ la tuta Esperantujo, organizinis sen-



precedencan virtualan renkontiĝon de esperantistoj, la plej amasan kaj enhavoriĉan en la historio de nia movado. La Asocio rapide trovis tute novajn alirojn teknikajn kaj organizajn. Certe estis multaj emocioj kaj duboj, ĉar neniam io tia aŭ simila okazis. Nun ni senhezite povas diri ke UEA sukcesis!

Ekde tiam VK iĝis tradicia kaj la plej granda virtuala renkontiĝo en Esperantujo. Ĝi montris daŭripovecon kaj iĝis bona ilo por UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale. Ĉi-jare, inter la 23-a kaj 26-a de novembro VK okazis por la 4-a fojo, kun 1236 aliĝintoj el 91 landoj (aŭ teritorioj).

La sukcesan integriĝon de UEA en la virtualan mondon, sekvas novaj defioj. Dum la pasinta jaro multo ŝanĝiĝis en amase uzataj ciferecaj teknologioj. Oni ne nur parolas pri integriĝo de interreto en la ĉiutagan vivon, kio estas memevidenta, sed ankaŭ pri la Artefar-

ita Intelektio (AI) kaj neŭroretoj. Menciindas ankaŭ blokĉeno, kiu estas uzata por la kriptovalutoj. Tiuj teknologioj plene ŝanĝas alirojn al ĉiuj sferoj en la vivo de la homaro, kaj, kompreneble, ankaŭ havas grandan influon al la nuna kaj estonta evoluo de Esperanto kaj la Esperanto-movado.

UEA, ĝiaj fakaj kaj landaj asocioj aktive sekvas la evoluon de tiuj ĉi teknologioj kaj esploras eventualan utiligon de ili por Esperanto. Ni dediĉis kelkajn artikolojn pri la temo en la pasintjara maja numero de la revuo *Esperanto* kaj daŭre sekvas la temaron. Ĉi-numere vi trovos artikolon pri la Japana Esperanto-Kongreso (p. 12), dum kiu oni i.a. diskutis pri la estonteco de Esperanto en la epoko de AI-teknologioj, kiel ChatGPT.

Tiu ĉi temaro estis vaste prezentita kaj diskutita dum la 4-a VK. Okazis prelego de KuboF Hromoslav "Ĉu ĉifrovalutoj solvos Esperantajn transpagajn problemojn". Temas pri la komuna laborgrupo de UEA kaj TEJO, kiu estis taskita esplori pri pagado inter landoj, ekz. de membraj kotizoj por UEA, aŭ antaŭpagoj por UK, uzante kriptovalutojn. Stela Besenyei-Merger prezentis la kvaran Interkulturan Novelo-Konkurson (INK), kies temo estas "Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj *Homo sapiens*". Kadre de la Scienca Kafejo okazis laŭtema prelego de "Robotoj alvenas – aŭtomatigo, artefarita intelekto kaj la minaco de la



senlabora estonto" de Peter Baláz (pri la Scienca programo – IKU kaj SK vidu ĉi-numere en la paĝo 20).

Menciindas ankaŭ la prezento de unu el la plej gravaj nuntempe interretaj projektoj en Esperantujo kun la titolo "Kial diskonigi eventojn per Eventa Servo de UEA?" de Yves Nevelsteen. Tiu ĉi reta servo de UEA ne plu bezonas apartan reklamadon inter esperantistoj, sed ja estas utile kaj interese sekvi la novaĵojn pri ĝi, des pli ke ĝi tre aktive evoluas kaj aldonas konstante novajn bonajn funkciojn.



Ĉi-jare la VK havis la saman kongresan temon, kiel la Torina UK, – "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj". Al ĝi estis dediĉitaj pluraj programeroj: prelegoj kaj antaŭregistritaj spektakloj. Kontribuis: Thomas Bormann, Judith Jackson, Raja Iftikhar, Manuela Ronco, Manuela Burghilea, Amri Wandel, Marija Belošević, Jérémie Sabiyumva, Constantine Mashauri, Marjolaine Bert, Ragnar Baldursson, Laura Brazzabeni ka.

Interalie la Kongresa Kuriero de la 4-a VK, kiu akompanis la kongresanojn antaŭ, dum kaj post la kongreso, nomiĝas *Migranta Hirundo*, kio aludas la kongresan temon. Ĉiuj ĝiaj numeroj

estas senpage elŝuteblaj en la retejoj de la Reta Revuo kaj VK.

La afrika voĉo laŭte aŭdeblis dum la kongreso. Certe multe temis pri la UK, kiu por la unua fojo iros al Afriko en 2024. I.a. okazis prezento de la venonta kongreso. Bedaŭrinde ne tre bona retkonekto ne permesis al John Magessa kaj Daniel Kanlipou rakonti kaj montri ĉion, kion ili volis rakonti kaj montri, sed helpis ilin Fernando Maia kaj Petro Baláz. Jam aperis la *Unua Bulteno*. Se vi ankoraŭ ne vidis ĝin, vi povas senpage elŝuti ĝin en la retejo de



UEA (<https://uea.org/kongresoj>), kaj, kompreneble aliĝi al la UK en Aruŝo! Kaj ankaŭ al ĝiaj antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj, dum kiuj vi povos konatiĝi kun afrikaj bestoj, grimpi Kilimanĝaron kaj admiri la bluan maron!

Apartan etoson kreas la kanto de la Esperanta kantisto Joel Muhire (Joe Mo) *Bonvenon al la 109-a UK* (vi povas ĝui ĝin ĉe <https://mallonge.net/164>). Ĝi estis prezentita ankaŭ dum la Malfermo de la VK.


Kadre de la Malfermo, la 23-an de novembro, Duncan Charters, la Prezidanto de UEA, vokis ĉiujn viziti la unuan UK en Afriko: “Multaj el vi pripensas Tanzanion, sed ni ne nur pripensu, ni iru”. Ĉar ne nur por subteni Esperanton kaj la movadon el Afriko tio indas, sed ankaŭ por akiri vere unikajn kaj neforgeseblajn sperton. Kompreneble, okazis ankaŭ prezento de la Afrika Komisiono de UEA, kadre de la Virtuala Movada Foiro.

Se paroli pri la menciita Virtuala Movada Foiro (ViMF), nun jam eblas konstati, ke tiu formo de virtualaj prezentoj iĝis sukcesa kaj populara. La ideo estas, ke simile al la ĉeestaj Uni-

versalaj Kongresoj, multaj Esperanto-asocioj, grupoj, entreprenoj, iniciatoj ktp. prezentas sin kaj sian agadon al ĉiuj kongresanoj.

Diference al la UK, kie la Movada Foiro okazas unufoje dum la alventago, kaj estas uzataj fizikaj tabloj/budoj, dum la VK ĝi okazas antaŭ kaj post la kerna programo. Kaj la prezentantoj rajtas okazigi ViMF-programerojn kelkfoje dum la kongresaj tagoj, kio donas eblon kapti la atenton de pluraj kongresanoj el diversaj horzonoj. Buntecon de la prezentoj kadre ĝi oni povas trovi en la programskemo (<https://vk.esperanto.net/2023/programo/>) kun la indiko “ViMF”.


Dum la VK la partoprenantoj povis ricevi klaran bildon pri la agado de UEA. Krom la kunvenoj de la komisionoj, menciindas la tradicia programero “UEA respondas”, kadre de kiu iu ajn partoprenanto de la kongreso povis starigi demandojn pri la agado de la Asocio al ĝia Estraro kaj la Ĝenerala Direktoro. Estis multaj demandoj pri la estonteco de la Biblioteko Hodler, kiu translokiĝis al la Pola Nacia Biblioteko (*Esperanto*, n-ro 7-8, 2023), la arkivoj de UEA, kiuj restas en Aŭstria Nacia biblioteko (*Esperanto*, n-ro 12, 2023), kaj la Centra Oficejo en Roterdamo, kie daŭ-



re laboras kelkaj oficistoj. Oni parolis ankaŭ pri la libroservo. Ĝia graveco estas senduba, kion montras ankaŭ la rezultoj de la enketilo de UEA. Dume ne estas difinitiva solvo pri ĝi, sed ĝi nepre daŭre funkcios. Pli detalan raporton legu en la *Migranta Hirundo*, n-ro 5: <https://mallonge.net/181>.

Okazis aparta programero “UEA ĉe UN kaj Unesko: 75 jaroj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj”, gvidata de Humphrey Tonkin, – diskuto kaj informado pri la interrilatoj de la Asocio kun tiuj ĉi tutmondaj organizoj.


En du apartaj sesioj Duncan Charters rakontis pri enkonduko al la kvar kolonoj de la Strategia Planado (KIRI – Kunlaborado, Informado, Rilatoj, Instruado). Krome li gvidis atelieron “Ĉu vi estas interkulture kompetenta?”, kies celo estas faciligi komunikadon inter diversnaciaj kaj diverskulturanaj pere de Esperanto.



Ni, kiel la redaktoroj de la oficiala organo de UEA, havis apartan programeron, similan al tiuj, kiuj okazas dum la UK-oj – “Legantoj de Esperanto”, kie la kongresanoj povis fari ajnajn demandojn, kritikojn kaj konsilojn rilatajn al la revuo. Ni dankas ĉiujn partoprenantojn, tiaj renkontiĝoj vere helpas evolui ĝin la aspekton kaj la enhavon, sekvi la ŝanĝiĝantajn preferojn de la legantoj.

Tiuj ĉi kaj multaj aliaj programejoj restis re-spekteblaj ĝis la 31-a de decembro en RetEvent (la sistemo de la kongreso, kien povas aliri ĉiu aliĝinto). Tio estas unu el la avantaĝoj, kompare kun la ĉeesta UK – eblas ĝui plurajn kunvenojn poste, ekzemple, se okazas kelkaj vizitindaĵoj samtempe, aŭ se pro iu alia kialo la kongresano ne povis partopreni dum la certa tempo.

Same kiel dum la antaŭaj jaroj la platformon kaj teknikaĵojn de la VK prizorgis la teamo de E@I. Ĝi ne nur brile konstruis la sistemon kaj faris ĉi-



ujn antaŭpreparojn, sed ankaŭ profesie teknike kaj organize subtenis la prelegantojn kaj partoprenantojn antaŭ kaj dum la kongreso.

Esperanta literaturo estas kaj restas unu el la plej gravaj tavoloj de la Esperanto-kulturo. Dum la VK estis prezentitaj pluraj eldonejoj (KAVA-PECH, E@I, Impeto, Lorenz, EAB ka.) kaj aŭ-



toroj (Petro Chrdle, Mikaelo Bronŝtejn, Sten Johansson ka.). Estis ankaŭ spektebla registraĵo de la programero "Libroj de la jaro", kiu okazis dum la 108-a UK. Alvaro Motta kaj Márcio Santos prezentis Bienalon 2023, la Internacian Libro-foiron de Rio-de-Ĵaneiro, kie ĉi-jare esperantistoj havis standon dum 10 tagoj, disvastigadante Esperanton inter libro-ŝatantoj.

Estis prezentita la lanĉo de la 4-a eldono de Interkultura Novelo-Konkurso (INK). Jam tri foje ĝi kolektis dekojn, poste eĉ centojn da noveloj el diversaj anguloj de la mondo, unuigintaj per unu temo, ĉi-foje vi estas invitata partopreni kun la temo inspire kaj timige aktuala: "Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens".

Ekde la dua eldono partopreni povas ne nur verkitaĵoj en Esperanto rakontoj. Eblas sendi novelojn en la itala, kataluna, persa, rusa aŭ ukraina. La detalojn de partopreno legu ĉe: <https://bobelarto.ink/leok/konkurso>.

Ne mankis ankaŭ surprizoj. Okazis brila programero "Babilu kun Humphrey Tonkin kaj Sara Spanò pri... Winnie-la-Pu". Legu pri ĝi en la artikolo de Anna Striganova ĉi-numere (p. 14).

Dum la 4-a VK estis aljuĝita la Premio Grabowski 2023 (legu pri tio en la paĝo 4 ĉi-numere).

La muzika programo konsistis ne nur el plenumo de muzikaĵoj, sed ankaŭ renkontiĝoj kun muzikistoj, kiel, ekzemple, la programero "Babilu kun Flávio Fonseca pri Brazilmuzika Klubo kaj Brazila Kolekto", kiu prezentis sian arton.



Certe okazis ankaŭ la programero de la Akademio de Esperanto "La Akademio respondas...", dum kiu Brian Moon, Probal Dasgupta, Bertilo Wernergren, François Lo Jacomo faris prezenton kaj povis respondi al demandoj de la publiko.


La solenajn Malfermon kaj Fermon de la VK tradicie gvidis Fernando Maia, unu el la ĉefaj motoroj de la virtualaj aranĝoj de UEA, kiun kelkaj kongresanoj nomas la "animo de la kongreso". Liaj varmaj, inspiraj paroloj kaj komentoj, ofte plenaj de amo, multe kontribuis al la ĝenerala etoso de la aranĝo.



Dum la solenaĵoj ne mankis ankaŭ la himno *La Espero*, kiu ĉi-jare sonis, plenumita de "Akordo" en sufiĉe klasika formo.

Se vi iam partoprenis UK-on, eble vi scias, ke post la fino de la oficiala parto de la taga programo kaj fermo de la kongresejo okazas pluraj neformalaj kunvenoj, eventoj, amikaj babiladoj, kafumadoj ktp. Same dum la Virtuala Kongreso la partoprenantoj 24 horojn diurne povis uzi specialajn retajn ĉambrojn: Kafejo, Koridoro kaj Drinkejo. Kie en la agrabla etoso eblas renkonti malnovajn kaj novajn amikojn kaj samideanojn.

Ĝis la 109-a UK en Tanzanio kaj la 5-a VK!



Al nia stoko de brokantaĵoj konstante aldoniĝas novaj (malnovaj) varoj. Vi trovas ilin en la sekcio por brokantaĵoj en katalogo.uea.org.

Interkultura Novelo-Konkurso (INK): 4-a eldono lanĉita kun nova temo

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) alvenas kun nova temo: **Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens**. La kvara eldono de la konkurso estas lanĉita dum la oktobra Retoso kaj estis rezulto de daŭra kunlaboro kun la Akademio Literatura de Esperanto (ALE), Bobelarto kaj aldone aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas stimuli novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj per la eblo konkursi en ses diversaj lingvoj: krom Esperanto, eblas konkursi en la itala, la kataluna, la persa, la rusa kaj la ukraina. Tradukaĵoj el aliaj lingvoj daŭre bonvenas.

Eblas gajni en la du kategorioj de komencantaj kaj spertaj verkistoj entute dek monpremiojn kun la suma valoro 4500 eŭroj. La prezidanto de la konkurso estas la irana esperantisto Ahmad Mamduhi, kiu estas ankaŭ prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).


La noveloj devas esti niam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi maksimume 2000 vortojn (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longo. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas menci en la sendoformularo. Konkursi eblas per du noveloj.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncituraj dum la 110-a Universala Kongreso de UEA en 2025. En la komencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de junio 2024.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: bobelarto.ink/konkurso.

Kadre de la tria eldono, kies temo estis *La sekreta vivo de miaj najbaroj*, la



Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 1331 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 48 landoj. La gajnintoj es-

tos anoncituraj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 109-a UK, okazonta en Aruŝo, Tanzanio (3 aŭgusto-10 aŭgusto 2024). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: uea.org/kongresoj/alighilo.

La du novel-rikoltoj de la antaŭaj eldonoj de la konkurso estas aĉeteblaj en la Libroservo de UEA (*Amo, tuso kaj forpaso*: katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=669 kaj *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*: katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=233), ankaŭ ĉe la eldonejo KAVA-PECH.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

37 verkistoj

39 noveloj

La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj

mendu ĝin tuj ĉe KAVA-PECH.CZ aŭ UEA-libroservo

buntaj rakontoj

Finalistaj noveloj de la dua eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso

KAVA-PECH

taksita ★★★★★

noveloj el 14 landoj

Poemo *Pensi Afrikon*

■ Herman Lodewyckx

Por la okcidenta mondo Afriko 'ekzistas' ekde la periodo de la Grekoj, kvankam ĝi estis ĉefe konata pro la norda marbordo de tiu kontinento. La portugaloj 'ekmalkovris' la marbordojn okcidente, sude kaj oriente. Oni konas la sinsekvajn historion de la sklavokomercado, de la koloniado je preteksto de civilizado (kaj evangelizado de la paganoj, de la 'prahomoj'). La pripensoj pri «Afriko» pligrandigas ĉe la afrikaj verkistoj ankaŭ post la malkoloniado dum la jaroj 1960.

Mi ne scias ĉu oni konas tiun deziron pripensi la 'aziecon' de Azio aŭ la 'amerikecon' de Ameriko, kiel oni faras pri la 'afrikeco' de Afriko. En Eŭropo, pro la starigo de Eŭropa Unio kaj pro la ondoj da enmigrantoj ekde la jaroj 1970, multaj homoj kontraŭstaras por defendi la 'eŭropajn valorojn', aŭ por klopodi ĉirkaŭlimigi la 'veran Eŭropon kaj ĝiajn valorojn', kiujn oni deziras meti en la konstituciojn aŭ en kursojn de civitismo.

Pensi Afrikon estas demando, ne nur kiel temo por romanoj kaj poeziaĵoj, sed ankaŭ por diskutoj en afrika filozofio. Interalie: kiel oni povas aŭ devas diferencigi la afrikan filozofion disde la okcidenta?

Nu, ĉu ekzistas tiu okcidenta filozofio? Ĉu ni parolu pri okcidentaj filozofioj, laŭ ilia historio (ekde la antikva Grekio ĝis la nuna epoko) kaj laŭ iliaj diversaj fluoj kaj branĉoj, disigitaj tra la mondo, kiuj eĉ influas la instruadon de la akademia filozofio en Afriko?

Ekde la eldono de la *Bantua Filozofio* de patro Pl. Tempels, la diskuto pri la statuso de la afrika filozofio samrangas kun la diskuto pri la afrika spaco kaj pri la afrikeco de tiu filozofio. La diskuto ne estas limigita per la afrikaj marbordoj sed daŭras en la eŭropaj ekskoloniaj landoj. Ĝi okazas ankaŭ dum diskutoj en Usono, kie la sklavokomercado havas



spurojn dum la pripensoj pri la identeco, kiel la raspartigo en Sud-Afriko. Iuj proponas la koncepton «Africana» por kombini la afrikanojn en la diasporon de Latin-Ameriko, de Karibio, de Usono, ...

Ĉu oni devas iri en la malproksiman estintecon por trovi sian identecon? Ĉu eblas trovi komunan identecon por ĉiuj afrikanoj kaj afrikaninoj, de nordo al sudo, de oriento al okcidento? Ĉu oni povas fidi la verkojn de 'afrikistoj' kiuj ĉiam rigardas deekstere? Kaj kion fari kun la lingvoj, kiuj venas el alia kontinento: la franca, la angla, la portugala, la nederlanda, ...? Ĉu ili estas obstakloj por libere esprimiĝi?

Ĉiu afrikano aŭ ne-afrikano, kiu spertis la afrikan kontinenton, konservas ankaŭ impresojn, ĉu pozitivajn, ĉu negativajn, ofte miksitajn.

Do, la teksto, kiu sekvas, fontas el persona sperto en Kongo (aŭ Zairio tiam) en 1980-1983 kaj en 1988. Same el restado en Mozambiko en 2007. Sed ankaŭ el legado de verkaĵoj de afrikaj filozofoj kaj el renkontiĝoj kun afrikanoj en Eŭropo. Tiuj impresoj estu legataj kiel pentraĵoj kun diversaj trajtoj kiuj estigas novan impreson de kuneco sen detaloj. Verŝajne estos la impresoj, kiujn havas multaj personoj kiuj aŭdos (ĉefe!) aŭ kiuj legos la tekston. Estas ankaŭ invito al la aŭskultanto aŭ al la leganto ke ili faru sian propran tekston aŭ pentraĵon.

Tiun ĉi tekston kun referencoj trovu en la *Reta Revuo*:
https://revuoesperanto.org/pensi_Afrikon (Red.)

Pensi Afrikon. Oostende, Belgio, la 30-an de junio 2017. Okaze de la 57-a datreveno de la sendependeco de Demokratia Respubliko Kongo. Esperantigis la poemon Flory Witdoeck. Miguel Fernandez deklamis la poemon "Pensi Afrikon" dum la Komenco de VEKI-1, la Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI: <https://mallonge.net/17u>.

Pensi Afrikon

estas pensi pri tiu grandega kontinento
kun tridek milionoj kvarcent dekkvin
mil okcent sepdektri (30.415.873)
kvadrataj kilometroj
kun ĝiaj tro ofte forgesitaj insuloj
kaj fuŝe situataj
de la mapistoj
sur la «carta mundi»
sed kiun oni retrovas ĉie en la mondo
per ĝiaj idoj
libervolaj kaj nevolaj,
per ĝiaj migrantoj
per ĝiaj sportistoj
per ĝiaj artistoj

per ĝiaj aŭtoroj
tiu diaspora Afriko
tiu disigita Afriko

Pensi Afrikon

estas pensi pri ĝia nomo,
donita de aliaj
naskiĝloko de la homaro
Afriko la majesta
Afriko la mistera
Afriko la danĝera
Afriko kelkfoje la mafia

Pensi Afrikon

estas pensi pri la kontinento de la
arbitraj landlimoj

la kontinento kun 55 nacioj
la kontinento kun pli ol 2 000 etnoj
parolantaj iliajn regionajn lingvojn
sed ankaŭ alilandajn lingvojn

Pensi Afrikon

estas pensi pri vasta naturo
pri dezertoj kaj arbaroj
pri riveroj kaj montaroj
pri arbustoj kaj plantoj
pri krulegaj bestoj kaj tedeĝaj bestetoj
sub brilanta suno
sub torentaj pluvoj
sub lumigataj noktoj
per steloj kaj luno

Pensi Afrikon

estas pensi pri ĝia klimato
tropika ĉe la ekvatoro
suferante pro la klimatsanĝo aliloke
estas pensi pri la tago kaj la nokto
kiuj sin intersekvigas laŭ 12-horaj cikloj
estas pensi pri dusezona kontinento
kun senĉesa sinsekvo
de seka kaj pluva sezono

Pensi Afrikon

estas pensi pri la subgrundo
malriĉa aŭ riĉa je krudmaterialoj,
la diamanto kaj la oro,
la uranio kaj la kobalto,
la kupro kaj la koltano
kaj iom da petrolo
fontoj de envioj, fontoj de perfortoj
tro malmulte da fontoj de komforteco
por la loĝantaroj
subpremitaj, malsategaj, forlasitaj

Pensi Afrikon

estas pensi pri la surgrundo
la kafo kaj la kakao
la bananarboj kaj la papajarboj
la kokospalmoj kaj la baobaboj



Pensi Afrikon

estas pensi pri la homoj
iamaj kaj nunaj
pri la prauloj kaj la novaj generacioj
estas pensi pri la rakontoj kaj la
proverboj
de la dioj kaj de la diaĵoj
de la ritoj kaj de la mitoj
de la fetiĉoj
de la inicadoj
kaj de la palavroj

Pensi Afrikon

estas pensi pri ĝia nebula historio de la
pasinteco
sed ankaŭ pri ĝia konata historio
de la imperioj
kaj de la reĝolandoj
de la sklaveco
de la raspargito
de la koloniado

de la malkoloniado
de la postkoloniado
de la naciismoj
de la tutfrikismo
de la sociinternaj militoj
de la tribaj perfortoj

Pensi Afrikon

estas pensi pri ĝiaj ŝtatestoj kiel Kwame
Nkrumah, Ahmed Sekou Toure,
Patrice Lumumba, Leopold Sedar
Senghor, Kenneth Kaunda, Yomo
Kenyatta, Julius
Kambarage Nyerere, Nelson Mandela,
kaj multaj aliaj ...
Sed ankaŭ pri ĝiaj ŝtatistoj malpli
konataj kiel Ellen Johnson, Joyce Banda kaj
Catherine Samba Panza
estas pensi ankaŭ pri ĝiaj diktatoroj kaj
diktaturoj
kies nomoj estas tro bone konataj,
estas pensi pri ĝiaj ribeluloj kaj ĝiaj
profetoj,

la marabutoj kaj la bardoj,
la fetiĉistoj kaj la magiistoj,
la magiistinoj,
la importitaj religioj kaj la aperintaj
sektoj,


estas pensi pri ĝiaj pensuloj,
ĝiaj romanistoj kaj poetoj
ĝiaj artistoj, pentristoj kaj skulptistoj
ĝiaj gemuzikistoj
ĝiaj gekantistoj
estas pensi pri ĝiaj gedancistoj
kun aŭ sen maskoj
subtenitaj per
la dĵemboj kaj la balafoj
la koraĵoj kaj la likemboj
la tamburoj kaj la tamtamoj
kun ilia nokta lingvaĵo ritmika, ritma
– noki, noki, –
– malembe, malembe –

Pensi Afrikon

estas pensi pri ĝiaj disigitaj vilaĝoj
kaj ĝiaj metropoligitaj urboj,
kun riĉaj, sed ankaŭ malriĉaj kvartaloj,
iliaj plivastigitaj familioj
kaj devojigitaj infanoj,
laŭdire sorĉigitaj
– pesa ngai mbongo –
estas pensi pri la parceloj kun
iliaj ĝojoj kaj iliaj festoj,
sed ankaŭ kun iliaj mizeroj,
iliaj partigitaj revoj
pri pli bona vivo
pri iama feliĉo
referinta aliloke

Pensi Afrikon

estas pensi pri ĝiaj bazaroj,
renkont- kaj interŝanĝ-ejoj,



ofte mastrumataj, regataj, vivigataj de la
panjoj,
oh, la panjoj!
– mbote bamama, mbote batata –
– bamama oĵe, batata oĵe –

Pensi Afrikon

estas pensi pri la klopodoj de tiom da
homoj
por trovi laboron,
por trovi ĉiutagan panon,
sub formo de rizo aŭ de manioko,
por instrui aŭ esti instruita,
por flegi aŭ esti flegita,
por festi aŭ esti festita

Pensi Afrikon

estas pensi pri ĝia diverseco, ĝia
multeco,
estas rifuzi
la unuaniman penson
la ununuran penson
estas pensi pri Afriko
nord-suda
orient-okcidenta
tiu Afriko
kolora
kaj plurdiversigita.





Japanana Esperanto-Kongreso kun la temo “Kion Esperanto nun revas por la mondo?”

Kawasaki, 21–22 oktobro 2023

■ Kitagawa Hisasi

Kun duobla kriza konscio pri la daŭripoveco de la japana nacia kongreso unuflanke kaj pri antaŭvidata granda historia turnopunkto por la lingvo Esperanto mem aliflanke, la organizantoj de la 110-a Japanana Esperanto-Kongreso (JEK) deklaris foriron de la ĝisnuna kongresa tradicio kaj efektiviĝis plurajn senprecedencajn aranĝojn, kiel, interalie, serio de antaŭkongresaj retaj diskutkunvenoj pri la kongresa ĉeftemo “Kion Esperanto nun revas por la mondo?”.

Krizosento 1

La ĝenerala maljuniĝo de la japana socio forte speguliĝas ankaŭ en ĝia Esperantujo. Ne plu estas tiom da lokaj Esperanto-grupoj kiom antaŭ 20 jaroj, kiuj havas sufiĉan energion por gastigi la jaran nesian kongreson, kiu tradicie havis sian lokon en diversaj urboj tra la lando. Kaj en 2022 finfine ne niu loka Esperanto-grupo anoncis sin preta kunorganizi la sekvajaran JEK en partnereco kun ĝia ĉefa organizanto, Japanana Esperanto-Instituto. JEI turnis sin al Esperanto-Societo de Kawasaki, relative aktiva grupo en tuja najbareco de Tokio, kaj persvadis ĝin akcepti, se

ne kunorganizi, almenaŭ helpi al JEI okazigi la kongreson. Nur rezulte de tia postkulisajo la 110-a JEK povis fine trovi sian lokon en la urbo Kawasaki.

Se la malemo aŭ malkapablo gastigi la kongreson daŭros deflanke de la lokaj grupoj, tamen, baldaŭ oni eble devos anonci, ke JEK ne plu okazos... almenaŭ ĉiujare.

Krizosento 2

Cetere, unu el la plej surprizaj novaĵoj en 2022, en la tempo, kiam oni ĵus ekokupiĝis pri la kongresa organizado, temis pri la lanĉo de ChatGPT kaj

aliaj tiel nomataj “generaj artefaritaj intelektoj”, kiuj kapablas dialogi kun homoj en diversaj lingvoj inkluzive Esperanton. Krome ni informiĝadis kaj plu informiĝadas pri ĉiam pli maturiĝanta teknologio de maŝintraduko kaj aŭtomata interpretado. Ĉu la lingvaj baroj de mil jaroj eble dissaltos en baldaŭa estonteco per la helpo de artefarita intelekto? Kian rolon la lingvo Esperanto tiam havos? Ĉu oni plu bezonos ĝin? Kian perspektivon entute ĝi nun havas? Jen gravegaj demandoj, al kiuj ni eksentis nin devigataj respondi.

“Ni ŝanĝu nin mem de Kawasaki!”

La ĉi-supraj du krizosentoj kondukis la organizantojn al la penso, ke JEK unuflanke devas reformiĝi en sia organiza maniero en direkto al simpliĝo kaj kompaktiĝo, tiel ke ĝia gastigado ne estu tro granda ŝarĝo por lokaj Esperanto-grupoj, kaj ke ĝi aliflanke havu kongresan temon vere gravan kaj diskutindan anstataŭ nur oreplaĉaj aŭ memflataj senenhavaj sloganoj. “Ni ŝanĝu nin mem de Kawasaki!” iĝis la devizo de la organizantoj.



En direkto al kompakta simpleco oni decidis: havi du-tagan kongreson anstataŭ tri-tagan, forlasante la jam preskaŭ 30-jaran kutimon; foroferi loĝigan servon kaj turismajn aranĝojn; kaj ĝenerale revizii la tutan kongresan programon.

Kaj jen la kongresa temo: “Kion Esperanto nun revas por la mondo?” Sed kiel trakti tiel grandan temon dum nur du-taga kongreso? Nenia timo. Ĉar oni elpensis manieron kompensi la perditan tempon multe pli ol sufiĉe.

Senprecedenca antaŭkongresa aranĝo

Oni povas diri, ke la 110-a JEK estis fakte inaŭgurita en la interreto jam naŭ monatojn pli frue ol kiam ĝi havis fizikajn tempon kaj lokon oktobre en Kawasaki. Sabate vespere, la 28-an de januaro, modesta nombro da vere interesataj movadanoj rete diskutis pri la temo “Ĉu la revoj de la tradicia Esperanto-movado restas plu aktualaj?”. Kvar similaj retaj debatoj sekvis en marto, majo, julio kaj septembro. La provokaj temoj (fakte “subtemoj” de la kongresa ĉeftemo), kiel, krom la supre citita, “Ĉu Esperanto ankoraŭ povas esti danĝera lingvo?” kaj “Virtualan lingvon en la virtuala epoko!”, plus sufiĉe detalaj kaj ĝustatempaj raportoj pri la diskutoj en la monata organo de JEI evidente stimulis onian intereson, el kio sekvis, ke la diskutsesioj havis ĉiufoje pli kaj pli da partoprenantoj, kiuj sume nombris ĉirkaŭ 200.

Se enkalkuli tiujn el la “antaŭkongresintoj”, kiuj pro diversaj kialoj rezi-



gnis vojaĝi al Kawasaki, la nombro de la kongresintoj nemal multe superus tiun de la oficiale registritaj kongresanoj, 307, kiu mem inkluzivas 85 retajn ĉeestantojn, parenteze, ne nur el Japanio. (Krome 45 ne-esperantistoj ĉeestis en publikaj programeroj, pri kiuj vi legos poste.)

Cetere, ĉu vin interesas, kia konkludo rezultis el la longa serio de diskutoj pri la kongresa temo? Fakte ne rezultis ia konkludo, pri kiu ĉiuj unuanime konsentus. Sed la procezo de la diskutado senkonteste helpis al ĉiu formi kaj profundigi sian propran ideon. Kaj do ĉiuj unuanime konsentus, ke indas aŭ eĉ endas daŭrigi la diskutadon.

Aliaj senprecedencaĵoj

La kongreso havis krome almenaŭ du aliajn senprecedencaĵojn: “Retan Kultur Festivalon” kaj aranĝon de, se tiel diri, “satelitaj” kongresejetoj en lokoj kelkcent kilometrojn for de Kawasaki.

En RKF estis seninterrompe surskrinigitaj ne malpli ol 25 Esperantaj filmetoj originale produktitaj de diversaj individuoj kaj grupoj. Ili fiere prezentis siajn belajn urbojn, rakontis malnovajn lokajn legendojn, muzikis, premierigis originalajn kantojn, dancis ktp., kaj oni povis spekti ilin aŭ rete aŭ en aparta tiucela ĉambro en la kongresejo. RKF sukcese tiklis la kreemon kaj sinesprimemon ankaŭ ĉe novaj samideanoj.

La “satelita” kongresejeto realiĝis en du urboj, Sendai kaj Naruto, pure dank’ al spontaneaj iniciatoj de la respektivaj lokaj esperantistoj. Temis pri etskala grupa kunspektado de rete elsendataj kongresaj programeroj. Tiu aranĝo ebligis, ke ankaŭ grandaĝuloj

malfortaj je cifereca teknologio ĝuu almenaŭ la plej gravajn partojn de la kongreso, kaj ke timidaj, tamen scivollaj komencantoj informiĝu, kiel aspektas Esperanto-kongreso.

Publikaj programeroj

Inter trideko da buntaj programeroj, kiuj preskaŭ ĉiam paralelis en kvar apartaj ĉambroj kaj unu salono, la jenaj eroj estis malfermitaj ankaŭ al ne-esperantistoj: 1) rapidkurso de Esperanto; 2) reta prelego de Kalle Kniivilä pri Ukrainio kun interpretado kaj enkonduko de Kimura Goro Christoph; 3) prelegoj de Sakai Kazumi, lingvopedagogo, kaj de Tony László, poligloto, plus ilia dialogo pri plurlingva edukado kaj eventuala rolo de Esperanto en ĝi; 4) intervjuo kun Komatsu Ayako, aŭtorino de pluraj porjunulaj romanoj, en unu el kiuj Esperanto ludas gravan rolon, kun la temo pri kultura kaj homa diverseco.

Dankoj kaj pri la venonta JEK

Pro la ĉeesto de pluraj partoprenantoj el eksterlando la kongreso aspektis sufiĉe internacia. Apartaj dankoj de la organizantoj iras al Adam Damaro Prakasa el Indonezio, Mireille Grosjean el Svislando, Julio Calegari el Brazilo, Stela Besenyei-Merger (rete) el Hungario, kiuj respektive kontribuis al la programo per sia interesa prelego.

La venonta, nome 111-a, JEK dumos la 3-an Komunan Esperanto-Kongreson de Japanio kaj Koreio, kiu okazos de la 4-a ĝis la 6-a de oktobro 2024 en Jeonju, Koreio.

La plej bona urso en la tuta mondo gastis ĉe la Virtuala Kongreso



■ Anna Striganova

Legu al viaj infanoj eĉ se ili estas jam plenkreskaj!

(Fernando Maia)

Mi unuafoje elfosis libron pri Winnie-la-Pu el plenplena gepatra libra ŝranko kiam malantaŭ mia fenestro, same kiel hodiaŭ, falis malrapida lanuga neĝo kaj la neĝeroj similis al abeloj tiel ageme flugantaj jen suben jen supren. Eble ĝuste abelo, ne neĝa, sed tute ordinara, allogis mian rigardon sur la kovrilpaĝo. La libro estis tiel malnova, ke flavaj folioj forfalas el ĝi kune kun multkoloraj bildoj, de kiuj al mi rigardis ludilaj ursido, porkido kaj multaj, multaj aliaj. Vidante tion, mia patro ridetis varmete, kiel ne ofte li ridetis ĉar li estis serioza plenkreska negocisto, kaj diris ke tio estas lia libro, la plej ŝatata libro de lia infaneco. Li montris al mi mapon de Pu-lando sur la unua paĝo. Mi tuj ekimagis, kiel mia patro voĉlegos la libron por mi, sed ja li jam estis senespere serioza komercisto, iom tro plenkreska por voĉlegi stultajn libretojn.

Vidinte en la programo de la VK prelegon “Babilu kun Humphrey Tonkin kaj Sara Spanò pri... Winnie-la-Pu” eĉ kun multon promesanta tripunkto en la titolo, mi ekĝojis. La programero ŝajnis al mi neordinara, tiel serioze malserioza se kredi al la nomo! Kaj malgraŭ la streĉita propra programo dum la VK mi senprokraste aldonis ĝin en mian kalendaron de neprevizindaĵoj. Aparte mi antaŭĝuis pri la parto de Sara ĉar ja mi jam spertis aŭdi, kiel ŝi voĉlegas. Tio estis ŝia propra monologo voĉlegita dum la UK en Lisbono, kiu poste longe sonis en mia memoro per ŝia voĉo tia virineca kaj, jes, iom sorĉistinea. Kaj nun, dum la prelego pri Winnie-la-Pu, mi eksciis, ke ankoraŭ ŝi tiel sonorilete, arĝentece kantas! Winnie-la-Pu ĉiam kantas elpensitajn de li mem amuzajn kantetojn, vi ja memoras, ĉu?

“Ram-tam-tidi-lam-tam. Se mi scias ion ajn pri io ajn, tiu truo signifas Kuniklon”.


Sed mi transsaltis la komencon de la evento, ni revenu al ĝi. La esperantlingva libro pri la ursido estis uzata dum poliglotaĵ eventoj por disvastigi

Esperanton kaj la afero estis ege sukcesa. Kompreneble! La libro estas konata verŝajne al ĉiu, kaj pro sia amuza facila saĝeco al ĉiu agrabla. Kiel Winnie-la-Pu venis en Esperantujon? En la komenco de la 1970-aj jaroj la eldonejo Dutton ricevis leteron de Ivy Kellerman Reed kun manskribita teksto de la traduko. Estinte tre sperta tradukistino, esperantiginta, ekzemple, *Kiel plaĉas al vi de Ŝekspiro*, ŝi tradukis *Winnie-la-Pu* maljunaĝe, kiam jam delonge ŝi ne estis en kontakto kun ordinara, ĉiutaga Esperanto, do ŝia traduko aspektis iom “lignece”. Humphrey Tonkin, kiu rakontis al la partoprenantoj de la VK tiun historion, estis tiam petita retajpi la manuskripton. Sub preteksto de retajpado li ŝanĝis multajn aĵojn, aparte la versetojn kaj konversaciojn de bestoj-herooj, simplegajn kaj ege komplikajn samtempe. Kaj jen, la libro aperis. Konsistanta el dek ĉapitroj.


Sara voĉlegis la duan, kie la ursido iom tromanĝis kaj fiksiĝis en enirtruo de kunikla domo; kaj Humphrey la trian – pri tio kiel la ursido kaj la porkido trovis spurojn de teruraj bestoj kaj planis ĉasadon. Kaj al kiuj vere apartenis tiuj pli-kaj-plimultiĝantaj spuroj, vi ja certe memoras, ĉu? Mi eĉ ne imagis, ke Humphrey, kiun mi ĉiam konis tiel serioza, povas tiel amuze legi!

Kaj la libro mem, aperinta sur la ekrano, kolorigis la impresojn per belaj klasikaj bildoj.

Sed la plej kortuŝa parto atendis ankoraŭ. Sur la ekrano aperis Edmund Grimley Evans, tradukisto de la dua libro pri la ursido. Edmundo tre ŝatis voĉlegi la unuan libron en Esperanto al sia eta filino, sed kiam ĝi estis plene tralegita kelkfoje, restis nenio krom traduki la duan. Do, li tradukis ne por eldoni, sed por legi al la filineto. Tamen la belega eldono de la libro *La Domo ĉe Pu-Angulo* aperis ĉe la eldonejo EAB en la jaro 2021 (kaj eĉ gajnis la premion de Belartaj Konkursoj!) kun ne nur belegaj, sed ankaŭ koloraj ilustraĵoj de E.H. Shepard. Ankaŭ la eldonanto Tim Owen aperis sur niaj ekranoj dum la programo, sed li, ve, ne voĉlegis.



Sara Spanò



Edmundo

Pu Faras Viziton 27



Do, li prenis la antaŭajn piedojn de Pu, kaj Kuniklo prenis Kristoforon Robin, kaj ĉiuj geamikoj kaj parencoj de Kuniklo prenis Kuniklon, kaj ili ĉiuj tiris kune.



Humphrey Tonkin



Antaŭ ol voĉlegi sian ĉapitron Edmundo diris timide, ke li perdetis la sperton de voĉlegado, ĉar ja lia filino aĝas nun dek ok (do kiel mia patro iam, ŝi estas jam senespere plenkreska). Kaj li eklegis tiel vigle, kvazaŭ ni spektus profesion bildfilmon, kaj li kantis ankaŭ, ĝuste tiel, kiel necesis, per tre serioza voĉo tiom neseriozajn kantojn (Humphrey bone diris: “Winnie-la-Pu penas konduki kiel plenaĝulo ne komprenante kiel esti plenaĝulo”). Do, Edmundo legis kaj kantis tiel bonegeserioze, kaj en lia ĉapitro falis neĝo, kaj malantaŭ mia fenestro ankaŭ falis neĝo, tute same kiel tiam, antaŭ multaj aliaj neĝoj, kiam mi unue trovis mal-

novan Winnie-la-Pu-libron de mia patro.

Kaj kiam denove sur la ekrano aperis Fernando en sia lanuga kaj tiel Winnie-la-Pu-eca pulovero kaj diris tiun frazon, de kiu mi komencis mian rakonton, ke eblas legi al infanoj eĉ se ili jam kreskis, mi pensis, eble nun, dum neĝas tiel lanuge, mi telefonu al mia patro. Li jam emeritiĝis kaj ne plu estas tiel senespere serioza negocisto. Kaj eble li trovu tiun libron, kaj eble li voĉlegu. Kaj, kiu scias, eble evidentiĝos ke ankaŭ li kapablas tiel kanti... tiel serioze... tiel ne seriozajn kantetojn.

“*Ram-tam-tidi-lam-tam. Se mi scias ion ajn pri io ajn...*”

Damne, kial mi ploras?

“– Mi estis *Stulta kaj Iluziiginta (...)*
kaj mi estas Urso Tute Sen Cerbo.
 – Vi estas la *Plej Bona Urso en la Tuta Mondo! (...)*
 – Ĉu vere? Ĉiukaze estas preskaŭ la *Lunĉa Horo.*
Do li hejmeniris ĝin manĝi”.



Kulturo


Tibor Sekelj – denove en la japana

■ Spomenka Štimec

La libro pri la brazilindiana knabo Kumeŭaŭa de Tibor Sekelj estas la libro originale verkita en Esperanto kiu havis plej grandan sukceson en la mondo! Neniu alia libro estis el Esperanto tradukita en tiom da lingvoj kiel tiu ĉi. Ĉu iu fidinde elnombris en kiom da lingvoj ĝi legeblas? Ĉu pli ol 30? Kaj eĉ pli: La prestiĝa japana infanlibra eldonejo Fukuinkan Shoten eldonis ĝin en 300 000 ekzempleroj. Ĝia tradukinto estis mirinda japana lingvomajstro Takasuga Itoru. Tiu lingva majstreco helpis ke la libro eniru lerneajn listojn de rekomenditaj legaĵoj por la lernantoj de la aĝgrupoj 11-13. En Esperanto ĝi aperis unuafoje ĉe TK en Kopenhago en 1979.

Por la jaro 2024 la eldonejo anoncis preparon de la nova eldono. Post 40 jaroj la eldonejo omaĝas al la fama tradukisto.

Eble nun estas okazo ke ni relegu la verkon en Esperanto aŭ en iu alia lingvo pri kiu disponas Libroservo.




Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo **Tibor Sekelj**

Rotterdam, 1994 (2-a eld.). Prezo ĉe UEA:

4,80 €, triona rabato ekde 3 ekz.

[https://katalogo.uea.org/katalogo.](https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2255)

[php?inf=2255](https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2255)



Unu poemo, unu urbo

Pri la 4-a Liaoninga Recitado de Esperantaj Poemoj

■ Wu Guojiang

Ĉina Asocio por Antaŭenigo de Demokratio (ĈAAD), fondita en 1945, estas unu el la 8 ĉinaj ĉefaj demokratiaj partioj partoprenantaj en la ŝtataj aferoj, kies eksaj prezidantoj estis fortaj subtenantoj de Esperanto, ekz. S-ro Xu Jialu, honora direktoro de la prepara komitato por la 89-a UK. La 28-an de julio 2023 la 4-a Liaoninga Recitado de Esperantaj Poemoj solene malfermiĝis en Shenyang, la ĉefurbo de Liaoning, Ĉinio, kune organizita de Liaoninga Esperanto-kultura Klubo (LEKK) kaj Komisiono de Kulturoj kaj Artoj sub Shenyanga Komitato de ĈAAD. S-ro Wu Guojiang, prezidanto de la klubo kaj direktoro de la prepara komitato de la recitado, faris la salutparoladon. S-ino Sarentuya, 74-jara fama poetino kaj ĉina unua-klasa verkistino, kiel reprezentantino de la kultura rondo faris belan kaj varman paroladon. Ŝi esperis, ke la recitado vere ludos rolon ne nur por la evoluo de la Esperanto-kulturo, sed por interŝanĝo inter diverslandaj kulturoj. S-ro Liu Weijie, Dumviva membro de UEA kaj konstanta komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo, s-ino Yuan Yadong kaj s-ino Chi Xiulan, vic-direktorinoj de la prepara komitato,

voĉlegis la gratulajn mesaĝojn. Ĝin partoprenis pli ol 50 personoj el Esperantujo kaj neesperantaj rondoj en Shenyang, Fushun, Dandong kaj Fuxin. Ĝin prezidis s-ino Wang Liqiu kaj s-ro Liu Zhiyun, lernantoj el la E-kursoj de la klubo, en Esperanto kaj la ĉina lingvo.

Liaoning estas unu el la tri provincoj en la nordorienta parto de Ĉinio kaj enhavas 14 urbojn. Pro ĝia graveco nelmultaj landoj historie establis siajn konsulejojn en Shenyang. Nun ankoraŭ troviĝas ĝeneralaj konsulejoj de 8 landoj, nome Rusio, Usono, Japanio, Demokratia Popola Respubliko de Koreio (Nord-Koreio), Respubliko de Koreio (Sud-Koreio), Francio, Germanio kaj Aŭstralio. La provinco havas pli ol 59 ĝemelajn urbojn en tiuj landoj. Tial en kaj pere de la ĉi-jara recitado ni deziris atingi tri celojn: la unua estas sufiĉe montri la specialan rolon de Esperanto en interŝanĝo inter ĝemelaj urboj. La dua estas efike reliefigi la gravecon de Esperanto en disvastigo kaj interfluo de la urbaj (lokaj) kulturoj. La tria estas plue vekti atenton de la diplomatoj al Esperanto kaj per tio ricevi socian aktivan eĥon. Tial ni oficiale sendis leteron al tiuj landaj asocioj, kun la listo de ĝemelaj urboj, kaj petis ilin transsendi al E-organizaĵoj aŭ esperantistoj en tiuj ĝemelaj urboj nian

volon: elekti kaj esperantigi poemon (16-20 linioj), kies aŭtor(in)o estas fama kaj neesperantista en la propra urbo.

Ni ne povis kontentige plenumi la unuan celon, sed ni akiris neatenditajn rikoltojn. Ni ricevis reagojn el ĝemelaj urboj nur en Japanio kaj Rusio. Horloĝturo estas la simbola konstruaĵo de Sapporo, la japana ĝemelurbo de Shenyang. Koncerne ĝin s-ro Ŭatanabe Takaŝi tradukis la poemon *Sonoras Sonoril' de la Horloĝtur'*, verkitan de Takaŝima Tecuo, en Esperanton.

Kia estas la printempo en la rusa ĝemelurbo de Vladivostoko Dalian? Ŝajne la respondo estas en la Esperanta traduko de s-ro Gennadji Ŝlepĉenko, prezidanto de la Esperanto-klubo "Pacifiko" en Vladivostoko, de la poemo *La Printempa Improvizado* de s-ro Boris Lapuzin. El la Esperanta traduko de s-ro Vladimir Opletajev de la poemo *Surguto* de Sergej Smetanin, kun titolo sama kiel la nomo de la urbo, ĝemeliĝinta kun Chaoyang, oni tuj scias, ke ĝi estas krudpetrola urbo. En la retpaĝo <https://vk.com/club59616356> estas multaj informoj pri la tiea Esperanto-movado, i.a. en la 28-a de oktobro 2023 la Esperantista Klubo "Revo" festis sian oran jubileon: 50 jarojn. La rusa urbo Tomsk estas unu el la plej antikvaj kaj belaj urboj en Okcidenta Siberio. Ĝi fondiĝis

Kunfoto antaŭ malfermo





S-ro Liu Zhiyun kaj s-ino Wang Liqiu prezidis la recitadon

en 1604 kaj ĝemeliĝis kun Jinzhou. S-ro Konstantin (Koĉjo) Obrascov elrusigis la poemon *Kaj pro kio betuloj bruetas por rus'?* de Miĥail Vasiljeviĉ Andrejev. Ĝi ankaŭ estas teksto de popularega kanto de la muzik-grupo "Lube". S-ro Vladimir Minin el la sama urbo, la rusa ĝemelurbo de Jinzhou, esperantigis du mallongajn poemojn *Aglo kaj homo* kaj *Tri blinduloj* de Aleksej Illiĉevskij.

Heinrich Heine estas unu el la plej famaj poetoj de Germanio kaj filo de la urbo Düsseldorf, kiu havas ĝemelan rilaton kun Shenyang. Informiĝinte, ke esperantistoj en Düsseldorf ne reagis al la recitado ĝis la 4-a de junio, s-ro Lars Sözüer en najbara urbo de Düsseldorf rapide sendis al mi tradukon plenumitan de L.L. Zamenhof mem de unu el la plej famaj poemoj de Heinrich Heine "Lorelej". En Aŭstralio ne ekzistas ĝemelaj urboj de la provinco krom Adelajdo, amikeca kunlabora urbo de Dalian. Tie s-ro Paul Desailly, atakita de serio da seriozaj sanproblemoj, rekomendis por la recitado la verkon *Ulliso* de Alfred Lord Tennyson (1808–1892), fama poeto de Britio, esperantigita de s-ro Ralph Harry (1917–2002), diplomato kaj eksa prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio. S-ino Auderskaja Tatjana Viktorovna el la ukraina urbo Odesa esprimis al la recitado subtenon per la Esperanta traduko de la poemo *Oni tempon konservis...* de Irina Ratuŝinskaja (1954–2017).

S-ino Wang Liqiu, s-ro Liu Weijie, s-ino Wang Xiaoli, s-ro Wu Guojiang, s-ro Shen Ning kaj s-ino Li Minlan ĉinigitis la supre menciitajn Esperanto-tradukojn kaj persone laŭlegis ilin en Esperanto kaj la ĉina lingvo. Cele al luda efekto fonaj videoj estis faritaj por ĉiuj tradukoj. Krome S-ino Zhu Chunru voĉlegis la poemon *Ho, Esperanto* de

Kálmán Kalocsay. Profesorino Wang Xiaoyi voĉlegis la poemon *Memoro* de la fama Esperanto-poeto Mao Zifu, s-ino Chi Xiulan, s-ino Liu Fang, s-ino Li Suhui, s-ino Yan Hong, s-ino Chi Xiujie, s-ino Dong Guizhi laŭte legis la ĉinan poemon *Danko* esperantigitan. S-ino Wang Mingying, s-ino Hong Li, s-ino Cao Cuiyun, s-ino Li Xiuli kaj s-ino Liu Enyan deklamis la ĉinan poemon *Kune Iru al la estonteco* kun la Esperanta versio.

Dandong Esperanto-Asocio (DEA) kaj Shenyanga Liuyinga Danca Trejnado helpe okazigis la recitadon. La asocio sendis 4-personan delegitaron; i.a. s-ro Liu Xuejun, prezidanto de DEA, recitis la poemon *Printempo en la aŭtuno* de Julio Baghy. S-ro Ma Fengchen kaj s-ro Sun Zhansheng ankaŭ el DEA voĉlegis la poemon *Ho, mia kor'* de L.L. Zamenhof.

Kiel helpaj programeroj la dancoj "Fluta legendo" kaj "Floroj kaj ĉevaloj", prezentataj de infanoj el la Trejnado, alportis al la recitado elegantan kaj gajan etoson.

Ni ne povis efike realigi la duan celon, sed ni akiris materialon subtenon kaj spiritan inspiron. Spite al tio, ke la spektantoj ĝuis la kulturojn de ĝemelaj urboj nur en tri landoj, ni ricevis gratulajn mesaĝojn de Serbia Esperanto-Ligo, la eksa UEA-prezidanto Renato Corsetti, s-ino Raymonde Coquisart el Francio, s-ro Peter Zilvar kaj s-ino Zsófia Kóródy kaj Esperanto-klubanoj el Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo en Germanio. Ni ricevis helpojn de tiuj landaj asocioj kaj esperantistoj kiel s-ro Aikawa Takuya kaj s-ro Hoŝida Acuŝi el Japanio, s-ro Aleksandr Lebedev kaj S-ro Vladimir Minin el Rusio, kiuj peris la informon pri la recitado. Ni profitis de la influo de la 15-persona organiza komitato, inkluzive de s-ino Yu Jianchao, s-ro Ma Fenchen, s-ro Mao Zifu, s-ro Liu Weijie, s-ro Liu Wei, Liu Xuejun, s-ino Chi Xiulan, s-ro Wu Guojiang, s-ino Yuan Yadong, s-ro Zhao Jianping, s-ro Hu Guopeng, s-ino Raymonde Coquisart (Francio), s-ro Renato Corsetti (Britio/Italio), s-ro Hori Jasuo (Japanio) kaj s-ro Huang Yinbao (vicigitaj laŭ la ĉina familia nomo).

Ĉi ĉio fariĝas la plej efika forto kaj spirita motoro por ni propagandi la recitadon al la socio kaj voki grandan resonancon en la socio. Entute kvar entreprenoj financis la recitadon. Ili

estas: Shenyang Hongtai Kosmektikaĵa Kompanio kun limigita respondeco, Shenyang Qiqi Reta Teknika Kompanio kun limigita respondeco, Ĉina Milla Biera Kompanio kun limigita respondeco kaj Meiyatu Federacio de Stomatologio. Ili provizis diversajn materialojn, ekz. puran akvon, brustajn florojn, verdajn pojnajn silkbendojn, donacojn (por gastoj kaj ĉeestantoj) ktp. Interese ke du entreprenoj "konkuris" por gajni "rajton" gastigi la recitadon. La partoprenintoj ĝuis bankedon en prezidanto-halo kaj pasigis plezurajn vesperojn.

Ni ne povis laŭvole realigi la trian celon, sed ni rikoltis valoran rezulton. Historie ekzistis faktoj, ke diplomatoj de la konsulejoj atentis pri la Esperanto-movado en la provinco (vidu sur paĝo 63-64 de la aprila *Esperanto* 1989 kaj sur paĝo 1329 de la novembro *Esperanto* 2018). Ĉi-foje ni volas denove voki la saman atenton, sed kompreneble pro objektivaj kialoj ni ne sukcesis kontakti diplomatojn en tiuj konsulejoj. Spite al tio, ni ankoraŭ zorgeme "ellaboris" raporton kaj videon per eksterlandaj gratulaj mesaĝoj kaj kontribuajtoj el ĝemelaj urboj, kaj cirkuligis ĝin en la neesperantaj rondoj per Vi-ĉato (We-chat). La efiko estas tre bona. Antaŭ la malfermo s-ro Geng Jun, eksa vica ĉefsekretario de la Liaoninga komitato de la Ĉina Komunisma Partio, gratulis nin per telefono. Venis s-ro Li Zengfu, konstanta konsiliano de la Ĉina Periodaĵa Asocio kaj eksa vic-ĉefdirektoro de la Liaoninga Ĵurnala Komunikada Grupo, kaj s-ino Liu Chunhong, direktorino de la Organiza Departemento de ĈAAD. Ankaŭ refoje venis s-ino Liu Xiushan, fama poetino kaj eksa prezidantino de la gazeto *Poema Ondo*.

Post la recitado nemalmultaj ĉeestintoj prezentis tiun okazon en siaj



Wu Guojiang kaj la fama poetino Sarentuya (maldekstre)

cirkloj de amikoj ĉe Vi-ĉato. Tio faris sensacion en la socio, ekzemple en la cirklo de s-ino Sarentuya centoj da ŝatoj estis videblaj, i.a. de s-ro Wang Yueqiang, prezidanto de la gazeto *Ĉina Poeto*, s-ro Bian Xiaorong, ĉefredaktoro de Hongkongaj Libraj Revuoj, s-ro Maple Leaf, vic-prezidanto de la reta literatura gazeto *Norda Ameriko Hanyuan* en Kanado, Tian Fang, ĉef-redaktoro de la gazeto *Tianjin-Poemo Reta Revuo*, Huang Yan, vica prezidantino de Hubei Changjiang de Ĵurnala Komunikada Grupo, s-ro Zhou Xinghua, eksa vic-prezidanto de Liaoninga Federacio de Literaturaj kaj Artaj Asocioj ktp.

La plej granda rezulto, kiun la recitado atingis, estas, ke Liaoninga Komunikada Universitato esprimis grandegan atenton pri Esperanto kaj engaĝis s-ron Liu Weijie kiel vizitan profesoron. La 18-an de oktobro, 2023, s-ro

Liu sukcese faris prelegon pri Esperanto en la Novaĵa Lernejo de la universitato. Pli ol 70 studentoj ĉeestis ĝin. S-ro Wang Shaochun, prezidanto de la lernejo, surloke transdonis al s-ro Liu Weijie engaĝan kontrakton.

Ni devas menci, ke la giganta laboro kolekti tradukaĵojn de la ĉina lingvo kaj fari videojn por ili, kontakti la koncernajn departementojn de diversaj registaroj, anticipe propagandi la recitadon, akcepti honorajn gastojn kaj persone elekti kaj transporti donacojn por la partoprenantoj, restas sur la ŝultroj de tri klubaninoj: Yuan Yadong, Chi Xiulan kaj Wang Mingying. Ili meritas niajn grandajn dankojn.

Iu diris, ke poemo estas bildo, poemo estas kanto, poemo estas pluvo, sed mi volas diri, ke poemo estas vojaĝo, poemo estas urbo. Kiam vi vere legas poemon pri urbo, vi komprenos



Prezidanto Wang Shaochun transdonis engaĝan kontrakton al s-ro Liu Weijie

tiun urbon. Probable vi ankaŭ scias, kion vere signifas poemo kaj malproksimo.

Ĉirkaŭ la 4-a Virtuala Kongreso aperis la Kongresa Kuriero, Migranta Hirundo. Vi povas senpage elŝuti ĝiajn numerojn ĉe:
https://revuoesperanto.org/Migranta_hirundo



2-A LITERATURA DUONMARATONO

ĈU VI PRETAS?

LA 9-AN DE MARTO 2024

bobelarto.ink/maratono

Produktiva jaro por la AMO-programo

■ Stefan MacGill

En 2023 okazis dek du seminarioj pri Aktivula Maturiĝo, ok en Eŭropo, unu en Ameriko kaj du en Afriko. Ĉi-jare mankas Azio; Oceanio montras sin nur per AMO 97, ja pri la regiono sed ne el ĝi. La sola monato sen seminario estis septembro – la postkongresa paŭzo.

La kulmino de la jaro certe estis la atingo de la centa seminario, kiu ja okazis en Hungario, same kiel la unua seminario en marto 2014. Cent seminarioj ene de naŭ jaroj – bona atingo. En 2023 ni bonvenigis seminariojn en du

novaj landoj, Latvio kaj Ĉeĥio – tiu lasta en Pardubice okazis kunlabore kun IFEF, Kosmos kaj la urba universitato. La plej aktiva membro de la komisiono de UEA pri AMO, Marija Beloŝeviĉ, prizorgis kiel ĉiujare, du seminariojn: februare temis pri amikeco kaj novembro pri bibliotekoj.

Du seminarioj (97 kaj 101) temis pri regiona agado kaj unu (104) pri tutkontinenta kunlaboro. Seminario 102 temis pri edukado kaj estis prizorgita de ILEI kadre de ĝia kongreso. Seminario 105 temis pri kultura konservado kaj estis prizorgita de KEU en Kroatio. Financo rolis en seminario 106 kaj teknologio en 107.

N-ro	Lando	Urbo	Mon.	Resuma Temo
97 V	Hungario	El Budapeŝto	jan.	Pacifika Progreso
98 V	Kroatio	Zagreb	feb.	Amikeco kaj SIA - Semajno de Int. Amikeco
99 V	Ĉeĥio N	Pardubice	mar.	Fervoja kontribuo (projekto Verden)
100 V	Hungario	Tiszafüred	jun.	La estonto por Esperanto post la jubileo
101 H	Latvio N	Ventspils	jul.	Balta kunlaboro
102 H	Italio	Lignano-Sabbiadoro	aŭg.	Interkulturo en lernejoj
103 H	Italio/PL	Pisa	okt.	Virinoj, kiuj ŝanĝis la mondon
104 H	Brazilo	Fortaleza	okt.	Tutamerika kunlaboro
105 H	Kroatio	Zagrebo	nov.	Esperantaj libroj en la publikaj bibliotekoj
106 H	Togolando	Lomé	dec.	Esperanto kaj mono
107 H	Burundo	Rumonge	dec.	Nova teknologio en instruado kaj komunikado
12	2 novaj			

Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



PATRONOJ de TEJO
Meksiko: D. Moreno Martínez

DONACOJ
ĝis la 5-a de decembro 2023

Amsterdama Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto

Nederlando: Esperanto Nederland 250,00.
Svedio: Sveda Esperanto-Federacio 1000,00.

Svislando: Svisa Esperanto-Societo 2000,00 (por 2022 kaj 2023).
Sumo ĉi-jara: 14247,00.

Fondaĵo Afriko

Usono: L. Mejo 15,00.
Por la UK en Arusha (Tanzanio):
Kanado: N. Fleury 100,00;
Z. Metz 100,00.
Div. malgrandaj: 5,00.
Sumo ĉi-jara 15269,05.

Fondaĵo Ameriko

Div. malgrandaj: 5,00.
Sumo ĉi-jara: 225,76.

Fondaĵo Azio

Japanio: Gotoo H. 61,96;
Nakatu M. 30,98.
Sumo ĉi-jara: 817,32.

Fondaĵo Canuto

Belgio: A. Nonima 74,00.
Luksemburgo: I. Ertl 20,00.
Nederlando: "BW" 50,00, R. Moerbeek 25,00.
Sumo ĉi-jara: 1621,49.

Konto Espero

Div. malgrandaj: 5,00.
Sumo ĉi-jara: 569,00.

Fondaĵo Junularo (TEJO)

Div. malgrandaj: 5,00.
Sumo ĉi-jara: 5,00.

Fondaĵo Partoprenu UK-n

Italio: rezulto aŭkcio UK Torino 2079,00.
Sumo ĉi-jara: 2801,00.

Unesko kaj UN

Div. malgrandaj: 5,00.
Sumo ĉi-jara: 5,00.

Virtuala Kongreso 2023

Sumo ĉi-jara: 5404,71.

Volontula Domo

Nederlando: "BW" 50,00.
Sumo ĉi-jara: 148,77.

Ĝenerala Kaso

Germanio: A. Nonima 888,76.
Nederlando: F. van Zoest 25,00.
Usono: L. Bennett 461,10.
Div. malgrandaj: 5,00.
Alianco 365: 155,00.
Sumo ĉi-jara: 12983,21.

Virtualaj Sciencaj kaj Fakaj kunvenoj (VK, IRIS) kaj nova esploro pri eksterplanedoj

Amri Wandel

La riĉa scienca kaj faka programo de la UK re-spekteblas en la Virtuala Kongreso (kiu plu viziteblas ĝis la fino de 2023), TEJO okazigis la duan virtualan Internacian Retan Interfakan Simpozion (IRIS), kaj jarfine okazis la 15-a sesio de la Internacia Vintra Universitato. Ekstermovade menciindas amaso da sciencpopularaj raportoj pri la lastatempa esploro de Amri Wandel pri la vivo-zono eksterplaneda.

Riĉa scienca kaj faka programo en la Virtuala Kongreso

Kiel anoncis nia rubriko en decembro, la partoprenantoj de la 4-a Virtuala Kongreso (VK) povis spekti grandan parton de la scienca programo de la UK en Torino: el 19 prelegantoj de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj Scienca Kafejo (SK), 13 ripetis siajn prelegojn dum la VK (vidu la aldonan tabelon). Tiuj prelegoj estas re-spekteblaj en la VK-platforno (ekzemple, <https://mallonge.net/17i>) ĝis la fino de 2023, kaj estos estontece videblaj en la jutuba kanalo UEA viva. Ankaŭ pli ol 40 prezentaĵoj de Fakaj Asocioj kaj grupoj okazis dum la VK kadre de la Virtuala Movada Foiro, pluraj el ili estas re-spekteblaj (<https://mallonge.net/17j>) ĝis la fino de 2023. Simile al la IKU-inaŭguro dum la UK, okazis "IKU-malfermo", dum kiu estis prezentitaj la 13 prelegoj kaj prelegantoj. La sciencon programon Amri resumis dum la fermo de la VK.

Tago	Preleganto	Temo	Konciza Titolo
23	Wandel	Astronomio	La Serĉo de Ekstertera Vivo, NIFOJ kaj SETI
23	Tuider	Esperantologio	La arkivo de la Universala Esperanto Asocio
23	Pennacchiatti	Esperantologio	La DNA de Esperanto
23	Goodall	Lingvistiko	Reguleco kaj nereguleco en la homa lingvo
24	Lo Jacomo	Matematiko	La matematikaj kalkuloj
24	Baláž	Robotiko	Robotoj: aŭtomatigo, AI, senlaboreco
24	Tonkin	Literaturo	Boulton – Ŝekspiro – Koriolano
24	Goes	Lingvistiko	La kikonga lingvaro
24	Raola	Kemio	Fizikaj kaj kemiaj karakterizoj de gemoj
25	Fontaine	Fiziko	Danĝera lumo
25	Labrie	Sociologio	Lingva pejzaĝo en lingve diversecaj urboj
26	Tarracchini	Pedagogio	De la pedagogio ĝis la neŭropedagogio
26	Jacobsen	Fiziko	Kvantuma interplekto: mistera kvantum-gluo

Internacia Vintra Universitato en Luminesk'

Jam la 15-an jaron okazas seninterrompe la Internacia Vintra Universitato (IVU) dum la jarfinaj renkontiĝoj en Germanio – komence dum la Internacia Festivalo kaj sekve dum Luminesk' kaj la Novjara Renkontiĝo. Ĉi-jare okazos kvin IVU-prelegoj dum Luminesk', <https://www.esperanto.de/eol/node/2975>, okazonta jarfine en la germana insulo Norderney. Ili temos pri *Sunhorloĝoj* (Christoph Roeter), *Judaj germanlingvaj poetoj dum la Tria Regno* (Christiane Oetter), *La Platdiĉa*

dialekto (Franz Kruse), *Instrui astrofizikon al laikoj kaj Ĉielaj Gastoj: asteroidoj, kometoj kaj meteoritoj* (ambaŭ A. Wandel).

Nova esploro de Wandel furoras en la monda amaskomunikado

La lastatempa malkovro de signoj de oceano kaj eventuale biologiaj molekuloj sur eksterplanedo (*Esperanto*, 2023:11 p. 238) spronis ne nur esplorojn, sed ankaŭ novaĵraportojn en la amaskomunikado. Unu ekzemplo estas nova artikolo de Amri Wandel pri kiu aperis novaĵraportoj en dekoj da amaskomunikaj portaloj kaj gazetoj tutmonde, inkluzive de MSN (*Microsoft News*), unu el la plej grandaj novaĵportaloj en la mondo, kiu atingas ĉ. 500 milionojn da spektantoj monate. Aliaj raportoj aperis i.a. en la prestiĝaj portaloj kaj gazetoj *Astrobiology* (<https://mallonge.net/17k>), *Spacedaily* (<https://mallonge.net/17l>), *BBN* (<https://mallonge.net/17m>), *Science Magazine* (<https://mallonge.net/17n>), *The Jerusalem Post* (<https://mallonge.net/17o>), *EurAsia Review* (<https://mallonge.net/17p>) ktp. Jen traduko de parto de la raporto en MSN (<https://mallonge.net/17q>).

La Vivo-Zono plivastigita per nova studo

Profesoro Amri Wandel de la Hebrea Universitato de Jerusalemo lastatempe faris pioniran esploradon, kiu defias kaj vastigas nian komprenon pri loĝeblaj eksterplanedoj. Lia studo, publikigita en la *Astronomical Journal*, emfazas la decidan rolon de subglacieja likva akvo en redifinado de la limoj de la tradicia Vivo-Zono.

Ŝlosila trovo de la studo estas la potencialo por vastigi la Vivo-Zonon, precipe por planedoj orbitantaj proksime al steloj el la speco "Ruĝa Nano". Tiuj steloj estas ofte konsiderataj la ĉefaj kandidatoj por detektado de spektraj vivo-signoj de eksterplanedoj.

La esploro detalias kiel atmosfero kaj likva akvo povus kunekzisti sur tiuj planedoj, tiel etendante la Vivo-Zonon preter antaŭe pripensitaj limoj. Ĉi tiu revelacio malfermas la eblon trovi likvan akvon sur pli larĝa nombro de eksterplanedoj, plibonigante la perspektivojn por malkovri eksterteran vivon.

Resume, ĉi tiu studo lumigas la decidan rolon de subglacia likva akvo en plilarĝigo de la Vivo-Zono, tiel plibonigante nian komprenon de eblaj vivsubtenaj medioj en la universo kaj la ekscitajn eblecojn de vivo ĉirkaŭ foraj steloj.

Dua Internacia Reta Interfaka Simpozio de TEJO


█ Marta Nowakowska
kaj Snehaja Venkatesh

Post la sukceso de retaj eventoj en 2020, TEJO komencis organizi Retoson, ne kiel alternativon al ĉeestaj eventoj, sed unu plian eventon por esperantistoj el la tuta mondo. Dum la unua Retoso en 2021, la komisionoj pri Edukado, Scienco kaj Universitata Agado de TEJO, kunlabore kun UEA, organizis la unuan Internacian Retan Interfakan Simpozion – IRIS (<https://iris.tejo.org/>).

La celo de la evento estis krei platformon por fakaj diskutoj kaj por kuraĝigi junulojn uzi Esperanton ankaŭ en siaj profesiaj kampoj. IRIS enhavas du partojn – mallongajn fakajn prezentojn kiujn ĉiuj povas spekti en la Jutuba kanalo de TEJO (<https://mallonge.net/17r>) kaj interfakan podian diskuton dum Retoso.

Estis decidite okazigi la simpozion ĉiun duan jaron kaj dum Retoso 2023 denove okazis la dua IRIS. Ĉi-foje estis du podiaj diskutoj: pri Lingvistiko kaj pri Scienco.

Karina Oliveira gvidis la podian diskuton pri Lingvistiko la 28-an de oktobro 2023. Venis tri kontribuoj: Viktoria Schmidbauer parolis pri Lingvaj dubaj okazoj, Roberto da Silva Ribeiro pri Elementoj de la Kariria Lingvo kaj Federico Gobbo prezentis pri Komparo inter denaskaj signolingvanoj kaj Esperanto-parolantoj. Marta Nowakowska kaj Allan Argolo gvidis la podian diskuton pri Scienco, kiu okazis la 29-an de oktobro 2023. Kvar diskutantoj preparolis diver-



sajn fakojn: renovigeblan energion, informadikon, konservadan biologion kaj matematikon. Ŝinja (Xīnyuán Hóu), doktoriĝantino pri atmosfera fiziko, parolis pri siaj esploroj de kalkulado de disponebleco de suna energio en malsamaj urbaj medioj. Uli Ender prezentis sian virtualan modelon, kiu povas esti uzata por demonstrado kaj instruado de funkciado de la maŝina kodo. Juan Jacobo Schmitter-Soto, doktoro de biologio, preparolis konceptojn kaj principojn de la konservado de la biodiverseco kaj ĝiajn etikajn kaj sociajn efikojn. Patricio Agustín Iglesias prezentis la leĝon de Newcomb-Benford – observaĵon, ke grandaj nombroj ofte komenciĝas per malgrandaj ciferoj.

Ĉiuj diskutantoj vigele partoprenis en la diskuto kaj danke al ili la publiko povis sperti ĉiun el la temoj de pluraj flankoj. Ĉiuj prezentoj estas spekteblaj en la jutuba kanalo de TEJO. La diskuto estis bonega ŝanco lerni kaj rimarki, ke scienco estas grava kaj interesa parto de Esperantujo.



Ĉu vi ŝatus pli da Esperanta bunteco en via hejmo? Abonu *Kontakto*!



Vidu kiel ĉe:



<http://kontakto.tejo.org/p/abonu-kontakto-r.html>



Amarílio Hévia de Carvalho (01.05.1933 – 04.11.2023)

■ James Rezende Piton


Amarílio Hévia de Carvalho mortis en Brazilo la 4-an de Novembro 2023. En la sama jaro, brazilaj esperantistoj tra la tuta lando festis lian 90-jariĝon, la unuan de majo, ĉar li estis unu el niaj plej popularaj movadaj figuroj, ankoraŭ tre vigla en granda aĝo. Unuaniman simpatian li havis de ĉiuj, pro la atento, kiun al ĉiuj li dediĉis.

Emerito, li transloĝiĝis el Rio de Janeiro, kie li tre aktivis en la loka E-movado. Li iris al la centra regiono de Brazilo, al la urbo Barra do Garças (ŝtato Mato Grosso) por instrui gejunulojn prepare al la kongreso de BEJO en Cuiabá, 1985. Li tie restis kaj fariĝis tre populara inter la loĝantoj, unue kiel laboristo kaj poste kiel volontula ĝardenisto de publika turismejo, la geoterma urba akvo-parko. Li estis ankaŭ volontula konservanto de granda naturrezerva parko. Amarílio okazigis kursojn de Esperanto en loka naturdefenda organizo, kun kiu li cetere kunlaboris. Krome dum jaroj li rolis en publikaj festoj de la urbo kiel Paĉjo Kristnasko (kiel oni nomas en Brazilo la ekvivalenton de Avo Frosto, kiu estas maltaŭga nomo por Kristnaskoj, kiuj okazas en la unua semajno de somero). Pro liaj nature blankaj longaj haroj kaj barbo, la lokaj infanoj certis, ke Paĉjo Kristnasko loĝas en Barra do Garças tra la tuta jaro.

Dum jardekoj, Amarílio trakuris plurmil kilometrojn de la landego, plej ofte aŭtobuse, por ĉeesti simple lokan, regionan aŭ internacian Esperanto-aranĝon. Armita per pezaj valizoj, la memdeklarita "E-kolportisto" veturis kun dekoj da modeloj de buntaj T-ĉemizoj pri Esperanto de li elpensitaj kaj produktitaj. Amarílio volis, ke ĉiu esperantisto vestu sin por varbi la mondon al nia lingvo. Kie iam rolis verdastela broĉo, eksmoda, li adaptis la E-brustojn al nia tempo, ĉar brazilanoj ŝatas movadajn T-ĉemizojn. Kaj tiel, kun vojaĝemo, T-ĉemizoj, simpatio kaj neforgesbla bon-

humoro, Amarílio konkeris la koron de generacioj de esperantistoj.

Iam li uzis la pseŭdonomon "Flava Kverko" (paŭsita sur la propra nomo, sed tiu ĉi bona elpensado poste ne plu videblis kiel subskribo sur liaj T-ĉemizoj). Ofte li parolis amuzajn esprimojn, kiel "Hohoho" (klasika rido de Paĉjo Kristnasko), kaj la sloganon "Ĉemizoj je prezo de (verda) banano" (tio



Amarílio Carvalho rolas kiel la brazila nacia heroo, Tiradentes (foto: Ana Miranda)

estas, malmultekostaj) li eĥigis en la koridoroj de tre multaj kongresejoj. Liaj T-ĉemizoj evoluis kun la teĥniko tra la jaroj kaj la kelkkoloran silkekranan metodon anstataŭis la printaj plurkoloraj fotografiaj bildoj. Dume liaj vojaĝemo kaj simpatio restis neŝanceleblaj, eĉ en granda aĝo. Nemalofte li donacis siajn varojn, kaj per tio li montris grandanimecon, pro amikeco aŭ por subteni movadajn iniciatojn.

Amarílio kontribuis per aktorado al multaj E-aranĝoj. Li verkis unuhoran monologon, "Joaquim José: Fido-plena Martiro", pri la brazila nacia heroo Joaquim José da Silva Xavier (1746–1792, konata laŭ la kromnomo Tiradentes kaj ekzekutita pro separatismaj ideoj).

Amarílio en tiu rolo montris sin kun mesiecaj tono kaj aspekto, en sutano ligita per granda ŝnuro (ĉar Tiradentes estis kondamnita kaj mortis pendumita). Amarílio ĉiam emociiĝis en tiu monologo, eĉ se li ĝin prezentis entute kvindek fojojn, en multaj okazoj portugallingve, kiel en lernejoj kaj universitatoj, kaj en aliaj laŭ la Esperanta versio de lia teksto, farita de Paulo Sérgio Viana. Lian teatraĵon oni spektis en E-asocioj kaj kongresoj, inter ili la UK-oj en Bonaero, Lille kaj Hanojo.

Li estis konata ankaŭ pro simpatia skeĉo de Sylla Chaves. Temas pri preskaŭ-monologo, kun sonĝo de la rolulo antaŭ Sankta Petro, petanta permeson por instrui Esperanton en la Ĉielo. Amarílio Carvalho popularigis tiun skeĉon pro regula prezentado en pluraj eventoj. Por la fina mallonga frazo de la rolo de "Sankta Petro", li surloke ĉiam kunvokis malsamajn esperantistojn por tiujn honorigi. Kiu rifuzus la inviton de tia simpatiulo?

La matenon de la 4-a de novembro, je 2 600 km norde de sia loĝurbo, Amarílio ne vekigis. Li gastis en hotelo de Fortaleza por partopreno en E-aranĝo, nome en la samtempe okazantaj 10-a Tutamerika (TAKE) kaj 57-a Brazila (BKE) Kongresoj de Esperanto. Tiam li ĵus lastfoje prezentis sin kiel la esperantiston en la Ĉielo. La programo en tiu sabato rapide adaptiĝis por kortuŝaj omaĝoj dum la vespero en la Placo Gentilândia, antaŭ busto Zamenhofa.

Funebra ceremonio kun malfermita ĉerko okazis en la sidejo de la urba konsilantaro de Barra do Garças. Post tio, plenumiĝis lia volo, ke lia korpo estu liverita al publika universitato por utiligo en sciencaj studoj.

Tiu perdo kaŭzis tutlandan konsterniĝon inter brazilaj esperantistoj. Amarílio Carvalho estis unu el tiuj modelaj membroj de nia "granda rondo familia". Antaŭ nur unu monato li estis en renkontiĝo en São Paulo, 1 500 km for de sia loĝurbo, kaj jam havis planojn por venontjaraj partoprenoj, inkluzive de la UK en Aruŝo.

Georgina Mercedes Almanza Lanz (Havano, 19.04.1933 – 01.11.2023)

Georgina Mercedes Almanza Lanz forpasis la 1-an de novembro 2023. Renoma kuba teatra, radia kaj televida aktorino, inspirinto kaj fondinto (fine de la kvardekaj jaroj de la pasinta jarcento) de la trupo "Las Máscaras", tre grava en la historio de la kuba teatro, kie ŝi havis plurajn ĉefrolojn.



Ŝi ankaŭ rolis en la filmoj "Amada" (Humberto Solás) kaj "Odiseado de Generalo José" (Jorge Fraga).

Pro sia multjara laboro por infanoj, ŝi iĝis membro de UNIMA (Internacia Unuiĝo de Pupistoj).

Plurfoje premiita pro sia arta laboro, en 2007 ŝi ricevis la Kuban Nacian Premion de la Radio. Kelkaj el ŝiaj aktoradoj dum jardekoj pliriĝigas hodiaŭ la kolekton "Heredaĵo de la kuba radio".

Georgina esperantistiĝis en 1988 kaj, junio de 1989, elstariĝis en la 2-a Kuba Kultura E-Festivalo per deklamado de "Latinamerika patro nia", de Mario Benedetti. La tutmonda esperantistaro malkovris ŝin en 1990 dum la 75-a UK en Havano, kie ŝi prezentis la monodramon "Eksterordinaraj deklaroj de Rosa Penderton" (de José A. Rodríguez) kaj la spektaklon "Rompo

kun mia rutino", kolekton de poeziaĵoj kaj etaj tekstoj de kubaj kaj alilandaj poetoj kaj verkistoj, kiel Jacques Prevert, Stanislav Stratiev, Gabriel García Márquez kaj Ernesto Cardenal. Kelkajn aliajn teatraĵojn ŝi prezentis dum la 78-a kaj 81-a UK-oj en Valencio kaj Prago, respektive, samkiel dum aliaj regionaj kaj naciaj kongresoj.

Kun ŝi ni ĉiuj diris "Esperanto por ĉiam" (ŝia spektaklo en la 95-a UK, Havano 2010). Kelkaj kubaj esperantistoj, la pasintan 19-an de aprilo, vizitis (aŭ telefonvokis) ŝin, celante omaĝi ŝian naŭdekan naskiĝtagon.

Shaban Hasani (22.07.1945 – 04.12.2023)

La 4-an de decembro 2023 en Tirana forpasis la prezidanto de Albana Esperanto-Asocio, membro de UEA ekde 1992, Shaban Hasani. Li naskiĝis la 22-an de julio 1945 en la vilaĝo Petkaj de Kukës, Albanio.



Omaĝe al Shaban

Ni atendis tiun tristan novaĵon, ĉar Shaban suferis ekde kelka tempo, li eĉ lastatempe ne povis moviĝi, nek volis ke la amikoj vizitu lin, por ke ili rememoru lin kiel normalan homon.

Shaban estas eble unu el miaj plej malnovaj amikoj, almenaŭ ekde 62 jaroj, kio pleniĝas ĉi-decembre, kiam mi vizitis lin en lia hejmo en la vilaĝo Pet-

kaj de la regiono Shëmri de la distrikto Kukës. Li estas la frato de Hasan, mia samklasano en la mezlernejo militista Skënderbej (1959-1960). Shaban estas samaĝa kiel mi. Li finstudis pri konstruĝenierio dum mi pri matematiko, sed ekde la komenco nin kunigis la lingvo Esperanto. Ambaŭ ni sekvis tiam, decembre 1961 – februare 1962, la kurson de la internacia lingvo en la eksa kulturdomo Ali Kelmendi en Tirana. Ni kune abonis la internaciajn revuojn en tiu lingvo, ĉefe *El Popola Ĉinio*, de Vjetnamio kaj Laoso. Ni ekkorespondis kun esperantistoj el diversaj landoj de la mondo. Jarojn pli poste, ni eksciis ke nia korespondado kun eksterlando estas kontrolata de la Ŝtata Sekureco, tial ni rezignis de ĝi. Ni atendis la jaron 1991, kiam fondiĝis la ne-registara Asocio Esperantista Albana en nia lando. Shaban estis ĉiam ĝia estrarano kaj, la lastajn dek jarojn, eĉ ĝia prezidanto. Kune ni atendis esperantistajn amikojn el diversaj landoj. Shaban eĉ invitis ilin al sia hejmo por resti kelkajn tagojn, kie servis lia edzino, nun jam forpasinta. Ankaŭ Shaban, danke al la Pasporta Servo, vizitis fremdlandajn esperantistojn

Kiel triste ke ni ne havas plu lin en la Asocio, en la familio, en la amikeca rondo. Ĉar li estas tre konata kiel konstruisto, ne nur en la distrikto Kukës. Sed estas liaj gefiloj, Ilirjan, Ermir kaj Tatiana, kiuj honorigis lin ie ajn. Ni rememoros Shaban respektoplene kaj amece por ĉiam!

Bardhyl Selimi



Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA!
Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso.
La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe <https://uea.org/alighoj>



109-a Universala Kongreso de Esperanto Aruŝo, Tanzanio

3 – 10 aŭgusto 2024



La Universala Kongreso de Esperanto venos al Tanzanio!
Aliĝu al la 1-a UK en Afriko: uk.esperanto.net/2024



UEA invitas proponojn por Ia Internacia
Kongresa Universitato en Aruŝo.

Bv. sendi resumon kaj biografieton (po ĉ. 5 linioj)
ĝis la 31-a de januaro al amri@huji.ac.il